

FLAM-analizo pri la stato de Esperanto en Bulgario

Farita kun deko da partoprenintoj en la sidejo de BEA en Sofio, la 29an de junio, 2014 inter 16.25h. kaj 17.00h.

La unuaj du temoj koncernas la agadon de BEA kaj la bulgara movado. La lastaj du temas pri la ĝenerala bulgara socio, la medio en kiu devas agi la esperantistoj.



FLAM
1

Fortoj

- Entuziasmaj, laboremaj membroj kun multjara sperto; forta kaj laŭdinda historio.
- La ekzisto de du-ĉambra oficejo kaj forluata ĉambro kiu kreas enspezojn.
- Reto de ĉ. 40 lokaj societoj, eĉ se nur ĉirkaŭ deko da ili povis reteni ejojn.
- Fortaj fakaj sekcioj: fervojistoj havas dek lokajn grupojn; blinduloj aktive agadas en memstara asocio, kun 4 lokaj grupoj (okazis tri LIBE-kongresoj en BG de post 2000).
- En 2013 elektiĝis nova estraro de BEA kun jarkunside aprobita 14-punkta plano por la evoluigo de la bulgara movado (vidu *Bulgara Esp-isto* 2014/1)
- Tiu estraro laboras teamece, kaj estas plenumitaj pli ol ses el tiuj punktoj, aliaj progresis, aliaj restas farataj, kaj iuj havas daŭran validecon.

Lamaĵoj

- Preskaŭ kompleta manko de junuloj en la lingvo-komunumo – BEJ ĉesis funkcii.
- Tre malfacila financa situacio en BEA kaj la societoj – spegule al naciaj problemoj.
- Perdo de eblo dungi pagitan oficiston por deĵori en la oficejo.
- Rigida kaj konservativa pensmaniero ĉe iuj agantoj. (iliaj propraj vortoj)
- Ĉeesto de eternaj komencantoj.
- Malfacileco bone prezenti Esperanton al la nuna publiko.
- “La movado ne sufiĉe eliras el la verdaj kadroj.”
- Malhelpoj vojaĝi kaj kontaktiĝi kun eksterlando, neeblo aliri alilandajn librojn.



Avantaĝoj

- Novaj ebloj per la reto havi internaciajn kontaktojn – eĉ se malmultaj membroj havas retaliron kaj bezonus trejnadon por ekuzi tion, se akirita.
 - Eblus kontakti junulojn rete kaj prezenti la lingvon al ili – kie la nunaj E-societoj luktus fari tion konvinke.
 - Aktiviĝas sociaj organizoj – artaj, pensiulaj, potencialaj similideanaj aliancoj.
- Subteno de la eduka Ministerio, rekomena letero al la Lernejoj Direktoroj por instruado de Esperanto.
 - Favoraj rilatoj de unuopaj Universitataj Rektoroj (Med. Univ. Plovdiv, Int. Univ. Karlovo, Univ. pri Bibliotekologio en Sofio...),
 - La agado de la Fakaj Asocioj de UEA helpas la motivigon de la studentoj (19-a IMEK, 2014, Budapeŝto)

Minacoj

- Tre malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj – signifa proporcio de la movadanoj estas pensiuloj, kun ege limigita pagipovo. Junuloj foriris amase eksterlanden por studi aŭ trovi laboron.
- Ekmanko de senpagaj ejoj akireblaj en pli etaj urboj – plikostigo de ejoj aliloke.
- La perdo de la kursejo/ripozejo en Pisanica liveris grandegan baton kaj perdis multan interagon kun eksterlandanoj. Multaj alilokaj kunvenejoj/kursejoj estis perditaj pro maleblo pravi juran posedon.
- La prestiĝo de la angla lingvo, precipe inter junuloj, malfaciligas la varbadon de novuloj. Enlande mankas faka literaturo en Esperanto en sufiĉa kvanto.

UEA dankas al la partoprenintoj pro la rapide kontribuitaj ideoj (la tuto daŭris 35 minutojn), kaj ankaŭ pro la permeso, ke ni vaste diskonigu la analizrezultojn, kiuj povos helpi al najbaraj landoj (en Rumanio ni antaŭ unu jaro faris similan ekzercon, kun surprize similaj konkludoj) kaj al asocioj tra la tuta mondo, kiuj utile povos mem organizi FLAM-analizojn por pli bone povi plani siajn estontecojn.

SMG, Sofio, 29an de junio, 23.05h; kun postpoluro interkonsente kun estraranoj de BEA.



Dum la dimanĉa kunsido, kiu finiĝis per la raportita FLAM-analizo. Tuj maldekstre de la vicprezidanto de UEA sidas Eva Bojaĝieva, tuj dekstre Mariane Evlogieva, du el la tri estraranoj de la nove starigita instruista sekcio de BEA, elektitaj en la kongreso en Velingrad en aprilo 2014 (la tria, Nikola Uzunov, ne povis ĉeesti). Ĉi tiu sekcio petos aliĝon al ILEI en Montevideo post deko da tagoj.

